

**NSiR - Nova Sento in Rete
N. 1123 (3/2022)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet
<http://iej.esperanto.it>

Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

LIBRERIA

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

feilibri@esperanto.it

INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

IL 5 PER MILLE ALLA FEI

Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi,
realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- Giornata della Memoria.....	2
- Si fa presto a dire pace.....	3
- Congresso a Brescia.....	3
- Ma serve davvero, oggi, studiare l'inglese?	3
- Civitana konsulto pri Eŭropo.....	3
- Eli Urbanová	5
- Staĝado ĉe Unuiĝintaj Nacioj.....	5
- Deklaro de la Afrika Komisiono de UEA.....	6
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton.....	7

MESSAGGIO DELLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA IN OCCASIONE DELLA GIORNATA DELLA MEMORIA, 27 GENNAIO

Ogni anno, il 27 gennaio, le Nazioni Unite celebrano la Giornata della memoria dell'Olocausto. Vengono ricordati i milioni di persone che sono state barbaramente uccise e i coraggiosi che hanno contribuito a salvare la vita di altri che altrimenti sarebbero morti. L'Associazione Esperantista Universale e la Federazione Esperantista Italiana (www.esperanto.it) partecipano alla giornata, ricordando in particolare le migliaia di esperantisti che sono morti, compresi i membri della famiglia di Ludovico Lazzaro Zamenhof, il creatore della lingua internazionale esperanto.

Lidia, la figlia di Zamenhof, fu assassinata nel 1942 nel campo di sterminio di Treblinka. In occasione dell'80° anniversario della sua morte, l'Associazione Esperantista Universale organizzerà nel 2022 diversi eventi in suo onore. Lidia Zamenhof, infatti, è stata attiva a livello internazionale nel diffondere la lingua ma soprattutto le idee di suo padre, in particolare l'umanitarismo, un'idea di universalismo umanista. La Germania nazista perseguì l'esperanto per diversi motivi. In primo luogo il suo creatore era un ebreo. Il movimento esperantista, inoltre, è legato a ideali solidaristici e pacifisti. Durante un suo soggiorno negli Stati Uniti per diffondere la lingua internazionale e il baha'ismo, Lidia chiese un'estensione del visto, ma l'Agenzia per l'Immigrazione degli Stati Uniti rifiutò. Fu quindi costretta a tornare in Polonia. Poco dopo, in seguito all'invasione della Polonia nel settembre 1939, Lidia fu accusata di aver diffuso propaganda antinazista negli Stati Uniti e arrestata.

Quasi tutti i membri della famiglia di Ludovico Zamenhof sono stati vittime della persecuzione nazista. Suo figlio Adamo fu arrestato e fucilato all'inizio degli anni Quaranta; nell'anno 1942 le figlie Sofia e Lidia furono assassinate a Treblinka insieme anche alla loro zia Ida. Solo il figlio di Adamo, che si chiamava anche lui Ludovico come il nonno, sopravvisse miracolosamente, grazie alla propria abilità e alla protezione di Padre Merceli Godlewski della Parrocchia di Tutti i Santi in piazza Grzybowski a Varsavia.

Il movimento esperantista piange soprattutto coloro che, a causa della loro razza, condizione fisica o a causa delle loro convinzioni politiche o sociali, sono morti per mano dei nazisti. Tra loro c'erano numerosi esperantisti in Germania, Polonia, Ungheria, Cecoslovacchia e altrove. Queste persone erano funzionari, insegnanti, medici, giornalisti, lavoratori, individui di ogni ceto sociale. E tra i sopravvissuti c'erano anche eroi esperantisti che hanno protetto altri dallo sterminio.

Oggi l'Associazione Esperantista Universale e la Federazione Esperantista Italiana ricordano sia le vittime di quella tirannia, sia coloro che vi si sono opposti. Le due associazioni promettono solennemente, di fronte all'esempio dell'Olocausto, di fare del proprio meglio per opporsi all'ingiustizia ovunque e ogni volta questa si verifichi.

SI FA PRESTO A DIRE PACE

Avete perso l'evento del 18 gennaio scorso, in occasione della Giornata della Pace, ecco il link! https://youtu.be/seJ6fv-_wtM

CONGRESSO A BRESCIA

Il consiglio direttivo della FEI, comprendendo che alcuni di voi ancora esitano ad iscriversi nel timore della attuale situazione sanitaria, nella convinzione che nei prossimi mesi si tornerà al normale ritmo di vita, e che il congresso avrà luogo regolarmente, come l'anno scorso è stato per il congresso di Assisi, ha deciso di lasciare a tutti altri 15 giorni per ripensare e decidere di iscriversi a questo importante appuntamento annuale, che quest'anno si annuncia particolarmente interessante per il programma che stiamo costruendo, per la parte culturale e turistica, considerando che da anni la FEI non organizza il congresso in Lombardia,

Quindi avete tempo sino al **15 febbraio** per iscrivervi pagando la quota del primo periodo, vale a dire 80 euro per associati, e 40 euro per i familiari.

Non esitate, e iscrivetevi

Vi aspettiamo a Brescia dal 20 al 27 agosto!

Il comitato organizzatore

MA SERVE DAVVERO, OGGI, STUDIARE L'INGLESE?

Ecco un interessantissimo spunto di riflessione proposto da Michele Gazzola, della Scuola di Scienze Politiche e Sociali Applicate dell'Università dell'Ulster, Irlanda del Nord.

https://www.corriere.it/scuola/medie/20_luglio_02/perche-scuola-conviene-studiare-tedesco-francese-piu-dell-inglese-99f6f35c-b609-11ea-9dea-5ac3c9ec7c08.shtml

CIVITANA KONSULTO PRI EŬROPO

Multaj samideanoj spertas teknikajn problemojn kiam ili intencas apogi la esperantistan kampanjon rilate al la eŭropunia Konferenco pri la estonteco de Eŭropo (ĝis marto/aprilo 2022). Ne malofte alvenas mesaĝoj, ke samideanoj malgraŭ la deziro engaĝiĝi en la kampanjo malesperas pro tiuj problemoj.

La partoprenado per la reta platformo, kiun EU starigis por la civitana konsulto kadre de la Konferenco, estas vere peza, malfacila afero - jam la registriĝo je la platformo prezentas teknikan baron. Kvankam verŝajne multaj samideanoj rezignis pro tio, feliĉe aliaj superis la malfacilaĵojn. Rezulte, la plej populara propono en la civitana konsulto (inter pli ol 12.000 proponoj), do la propono kun la plej granda nombro de apogantoj, estas propono, kiu pledas por la instruado de Esperanto en lernejoj. Ĝi troveblas per <https://mallonge.net/propono>.

Grava aspekto de la tuta agado - kiu nur sukcesos kun via apogo - estas, ke nia kampanjo havas du elementojn:

- informado de samideanoj pri la EU-Konferenco kaj instigo al partoprenado en ties civitana konsulto
- kontaktado de la konferencantoj (reprezentantoj de la Eŭropa Parlamento kaj de membroŝtataj parlamentoj, politikistoj de la Eŭropa Komisiono kaj de naciaj registaroj, ktp.) por prezenti al ili la argumentojn favore al Esperanto kaj atentigi pri la elstara aprezado de por-esperanta propono en la civitana konsulto far EU-civitanoj

Dum la unua kampanjaĵo (partopreni la civitanan konsulton) malfacilas pro teknikaj problemoj, la dua (kontakti konferencantojn) estas pli "klasika" elemento, en kiu ĉiu povas partopreni senprobleme: sendi mesaĝon (retmesaĝon, leteron aŭ poŝtkarton) al unu aŭ kelkaj (laŭeble multaj, memkompreneble!) konferencantoj. Tiamaniere ni optimume ekspluatas la sukceson de nia propono kaj atingas la celon paroligi pri Esperanto en eŭropuniaj politikaj kaj publikaj rondoj. Ĉi tio havas daŭripovan efikon: ni starigas kontaktojn kun politikistoj kaj semas la kampon por venonta argumentado favore al nia lingvo.

Ĉu mi povus instigi vin viavice instigi pliajn samideanojn partopreni ĉi tiun duan fazon de la kampanjo? Ni presigis poŝtkartojn, kiujn ni senpage sendas al Esperanto-asocioj kaj kluboj en EU por la uzo de samideanoj. Ni ankaŭ proponas ekzemplon de letero, kiun oni povas sendi surpapere aŭ retmesaĝe al la konferencantoj. Ĉiuj utilaj informoj troviĝas en la informilo elŝutebla per <https://mallonge.net/eu-karto>.

Tre ĝojigus nin via apogo de la kampanjo en la dua, tre grava fazo!

ELI URBANOVÁ: 100 JAROJ DA ĈEESTO, 10 JAROJ DA SOPIRO

En 2022 UEA memoras 100 jarojn da ĉeesto kaj sopiras pro 10 jaroj de la forpaso de [Eli Urbanová](#). Ĉeĥa poetino, kiu per multo kontribuis al la Esperanta literaturo, Eli Urbanová naskiĝis la 8-an de februaro 1922, antaŭ 100 jaroj, kaj forpasis la 20-an de januaro 2012, antaŭ 10 jaroj. Ŝi tamen estis tia verkistino, kiu per sia talento poreterne ĉeestos inter ni.

Profesie instruistino, ŝi esperantistiĝis en 1948 kun Ŝtefo Urban, ŝia edzo ĝis 1955 kaj aŭtoro de la versa fablaro [Nova Ezopo](#) (1961). Ambaŭ membriĝis en la Praga Esperanto-Klubo en 1949 kaj baldaŭ ekverkis en Esperanto.

Jam en 1940 Urbanová aperigis poemaron en la ĉeĥa. En la periodo 1952-1957 ŝi ricevis dek premiojn, i.a. la unuan premion pri poezio en la [Belartaj Konkursoj de UEA](#) en 1954. Fortan impulson al Urbanová donis ŝia amikiĝo kun Julio Baghy, kun kiu ŝi ekkorespondis en 1952 kaj kiu vizitis Pragon en 1956. Ŝi aperigis la poemarojn [Nur tri kolorojn](#) (1960), [El subaj fontoj](#) (1981), [Verso kaj larmo](#) (1986), [Vino, viroj kaj kanto](#) (1995), [Peza vino](#) (1996; dulingva, kun ĉeĥa traduko de J. Rumler), [El mia buduaro](#) (2001), [Rapide pasis la temp'](#) (2003) kaj [Prefere ne tro rigardi retro](#) (2007). Ŝiaj poemoj! aperis a nkaŭ en la kolektoj [Kvarfolio](#) (1976) kaj [Eli Urbanová: nuntempa Esperanta poetino](#) (2005), krom en [Esperanta antologio](#) (1958 kaj 1983). Ŝia literatura ĉefverko tamen estas [Hetajro dancas](#) (1995), ampleksa aŭtobiografia romano, kiu ricevis la OSIEK-premion en 2001. Urbanová multe artikolis pri Esperanto en la ĉeĥa kaj instruis la lingvon.

En 1957 ŝi kunfondis Internacian Verkistan Asocion, kiu funkciis dekon da jaroj. Ĝin sekvis en 1983 Esperantlingva Verkista Asocio, en kiu ŝi ankaŭ membris. De 1975 ĝis 1980 ŝi estis juĝanto pri poezio en la Belartaj Konkursoj. En 2003 OSIEK dediĉis sian konferencon en Prago parte al ŝia verkaro. Ĝia prelegaro, [Intimaj temoj en Esperanto-beletro](#), aperis en 2005. Urbanová estis membro de la Akademio de Esperanto (1986-1995). En 1996 ŝi fariĝis Honora Membro de UEA. Saman distingon ŝi ricevis de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en 1982.

Preskaŭ ĉiuj el ŝiaj verkoj disponeblas en la Libroservo de UEA kontraŭ specialaj prezoj: <https://katalogo.uea.org>. Eli Urbanová estas unu el la Esperanto-verkistoj omaĝataj de UEA en la 135 jaroj de Esperanto #NiaLingvo. La Asocio forte kuraĝigas al ĉiuj akiri la librojn kaj konatiĝi kun tiu, kiu estis giganta virino, pensinta multe pli antaŭen ol ŝia tempo. La teksto de tiu ĉi Gazetara Komunikado baziĝas sur enhavo de la [marta numero de 2012](#) de la revuo *Esperanto*.

STAĜADO ĈE UNUIĜINTAJ NACIOJ: INFORMO DE LA NOVJORKA OFICEJO DE UEA

La Novjorka Oficejo de UEA informas, ke en la kunteksto de la kreado de la unua Strategia Politika Kadro pri Multilingvismo de la UN-Sekretariato la Oficejo de la Suba Ĝenerala Sekretario, pere de la Departemento pri la

Ĝenerala Asembleo kaj Administrado de Konferencoj en Novjorko, de Unuiĝintaj Nacioj, serĉas lingvo-politikan kaj datum-analizan staĝanton (anonco en la angla):

<https://careers.un.org/lbw/jobdetail.aspx?id=172108&Lang=en-US>

La staĝo estos por la daŭro de du monatoj ekde marto 2022 (dato konfirmota post konsulto kun la elektita kandidato). Pliaj detaloj pri la kondiĉoj kaj kriterioj por elekteleco (inkluzive de bezonataj lingvokapabloj) kaj la antaŭvidataj labormanieroj estas priskribitaj en la supra anonco.

La limdato por kandidatiĝoj estas vendredo la 11-a de februaro 2022.

DEKLARO DE LA AFRIKA KOMISIONO DE UEA OKAZE DE LA MONDA TAGO DE LA AFRIKA KAJ AFRIKDEVENA KULTURO, 24 JANUARO 2022

Okaze de la Monda Tago de la Afrika kaj Afrikdevena Kulturo, la 24-an de januaro 2022, la afrikaj esperantistoj pere de la Afrika Komisiono de Universala Esperanto-Asocio (UEA) deklaras sian senrezervan subtenon al ĉi tiu tago starigita de Unesko en 2019 kaj al ĝiaj celoj, kiuj estas gravaj kaj por Afriko mem kaj por la mondo, kie vivas konsiderinda kvanto da afrikdevenaj homoj.

La temo de ĉi tiu tago estas grava por la tuta mondo, ĉar ĝi volas substreki la homajn valorojn de la afrika kulturo, kiuj povas pozitive efiki ankaŭ ekster nia kontinento. Ni kiel afrikaj esperantistoj kaj aparte kiel Afrika Komisiono de UEA alte taksas tiun agadon kaj provas disvastigi nian afrikan kulturon al la tuta mondo pere de la internacia lingvo Esperanto, kiu mem estas ilo por egalaj rilatoj inter la popoloj de la mondo por atingi interkonatiĝon kaj pacon.

Niaj asocioj, societoj kaj kluboj en preskaŭ ĉiuj landoj de Afriko kunlaboras dum la tuta jaro kun parolantoj de Esperanto en aliaj kontinentoj kaj konstante interŝanĝas ideojn kaj informojn pri afrikaj specifaĵoj. Afrikaj esperantistoj produktis verkojn, kiuj spegulas la variecon kaj riĉecon de la nuntempa afrika kulturo kaj la problemojn, kiujn ni frontas. Tiuj verkoj atingas homojn en aliaj kontinentoj.

Rimarkindaj estas filmoj en Esperanto kreataj en Afriko, aparte en la Demokratia Respubliko Kongo, pri la tragediaj problemoj ligitaj al milito. Abundas ankaŭ kantoj kaj muzikaĵoj kreitaj de afrikaj muzikaj grupoj, kiuj iĝas famaj tra la tuta mondo inter parolantoj de la internacia lingvo Esperanto.

Samtempe ni partoprenas la agadojn instigatajn de Unesko pri la grandaj temoj de virina samrajteco kaj de valorigo de la propraj afrikaj lingvoj kaj en ĉi tiu spirito ni alvokas al la popoloj de la mondo interesiĝi pri la lingvo Esperanto, kiu permesas ideo-interŝanĝojn inter egaluloj, kaj pri nia agado por diskonigi pere de ĝi la afrikan kulturon.

EH, TIO NE OKAZOS, SE ONI UZUS ESPERANTON



I musei sono luoghi meravigliosi, in cui ho passato giornate stupende; confesso di non guardare sempre tutti i cartellini che identificano l'opera esposta, ma questo mi fa pensare che dovrei farlo più spesso. Chiesa di Santa Maria in Portico, Fontegiusta, Siena: traduttore decisamente materialista...